ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE SLOVENIA ESPERANTO LIGO

# INFORMACIJE INFORMOJ

Leto / jaro 11, št. / n-ro 1 marec / marto 2005

## Skupščina Združenja za esperanto Slovenije bo 9. aprila

Letošnja redna letna skupščina Združenja za esperanto Slovenije bo 9. aprila 2005 v Ljubljani. Kot običajno bo skupščina obravnavala poročilo o delu v letu 2004, finančno poročilo za leto 2004 ter predlog programa dela za leto 2005.
Predvidoma isti dan bo tudi izredni občni zbor Esperantskega turističnega društva Ljubljana, kjer bodo v smislu ugotovitev Sektorja za upravne notranje zadeve Upravne enote Ljubljana, sprejeti sklepi in ukrepi proti bivši predsednici Esperantskega turističnega društva zaradi protizakonitih sklepov o prodaji prostora in predloga za izbris društva.

## La venontaj Esperanto-Naĝ-Tagoj

Multaj partoprenintoj de la lastaj du ENT-aranĝoj jam demandas, kiam ni organizos la venontan aranĝon. Pro la translokiĝo de la ĉefa organizantino Manca Turk el Ljubljana al Bruselo, kie ŝi ricevis novan postenon, la venonta ENT-aranĝo okazos verŝajne en la aŭtuno 2005 en Slovenio. Lokon kaj daton ni anoncos en nia bulteno Informacije/Informoj. Se vi deziras partopreni, bonvolu sendi mesaĝon al informoj@volja.net.

## Fotogalerioj de du aranĝoj

Fotoj de la Mont-Kabana Renkontiĝo, okazinta en septembro 2004 en Pliskovica troviĝas ĉe http://www.svet-je-lep.com/gallery/MKR-Pliskovica .
Fotoj de Trilandlima renkontiĝo, okazinta en septembro 2004 troviĝas ĉe http://www.svet-je-lep.com/gallery/Tromeja2004.

## Slovenia Esperanto-Ligo ekhavis la plej junan anon

La 25-an de februaro 2005 je la 2h32 naskiĝis sana knabo, kiu ricevis la nomon Tomaž. La feliĉaj gepatroj estas slovenaj esperantistino Anka Vozlič kaj (ankoraŭ) neesperantisto Simon Urh.



Anka kaj Tomaž antaŭ naskiĝo

Pluaj fotoj de Tomaž, Anka kaj Simon estas ĉe http://www.svet-je.lep.com/gallery/Tomaz. Ni gratulas kaj bondeziras!

## Korespondado kun japanoj

Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto serĉas geesperantistojn, kiuj interesiĝas pri korespondado kun japanoj.
Bonvolu kontakti la Korespondan Servon de Japana Esperanto-Instituto, Sinzyuku-ku waseda-mati 12-3, Tokio, 162-0042 Japanio.
En letero ne forgesu mencii viajn aĝon,

sekson, profesion, interesojn kaj preferojn. Nepre aldonu du internaciajn respond-kuponojn por faciligi ilian laboron.

N. Sakurai

## Internacia montgrimpado sur Triglavon

En aŭgusto 2005 okazos internacia montgrimpado sur Triglavon, la plej altan monton de Slovenio. Temas pri la ne-esperantista aranĝo, tamen ĉiuj bonvenas. Jam interesiĝas pri la aranĝo unu viro el Britio, du virinoj el Hungario, unu viro el Kroatio kaj unu viro kaj unu virino el Slovenio. Detalojn ni aperigos en venontaj numeroj de nia bulteno.



Foto de la lasta montgrimpa karavano al Triglav

## Karavano al la 90-a UK en Litovio

La 90-a Universala Kongreso okazos inter la 23-a kaj la 30-a de julio 2005 en Vilno, Litovio.
Litovio estas lando kun miljara historio, situanta en geografia centro de Eŭropo. Litovoj estas baltoj. La litova lingvo estas la plej arkaika vivanta hindeŭropa lingvo. En kunligo de la 14a kaj 15a jarcento Litovio fariĝis unu el la plej grandaj ŝtatoj de Eŭropo kun teroj de Balta ĝis la Nigra maroj. Inter la 14a kaj la 17a jarcentoj en la lando vigle kreskis urboj, urbetoj, prosperis metioj kaj komerco, estis fondita jezuita kolegio, kiu en la jaro 1579 transformiĝis al universitato de Vilno – grava centro de eŭropskala scienco kaj klerigo. Litovio estas la sola inter la tri baltaj ŝtatoj, havanta miljaran historion de sia ŝtateco.
Geesperantistoj, kiuj interesiĝas pri la tradicia karavano el Zagrebo al UK, kontaktu Faruk Islamovič (faruk.islamovic@zg.htnet.hr) aŭ Tomislav Divjak (tdivjak@hotmail.com) aŭ vizitu la retejon http://www.esperanto.hr.
La tuta vojaĝo kostas 490 eŭrojn por esperantistoj kaj 540 por neesperantistoj. Eblas pagi en 6 partoj.
Al la kongreso jam aliĝis pli ol 1500 geesperantistoj el pli ol 50 landoj.

## 3-a familia Mont-Kabana Renkontiĝo

La 3-a familia Mont-Kabana Renkontiĝo ĉi-jare okazos inter la 13a kaj 15a de majo 2005 en montkabano Dom na Mrzlici (1093 m) sur monto Mrzlica en meza Slovenio, proksime al urbo Celje.
La ejo estas atingebla aŭte kaj taŭga por familia umado. Kiel antaŭe la aranĝo ne havas fiksan programon, sed eblas ekskursi al najbaraj pintoj, ludi sur herbejoj kaj en eta infanludejo kaj ĝenerale ripozi.
Detalajn informojn kun prezoj, aliĝilo kaj bildo de la ejo trovu sur la jam konata MKR-retpaĝo http://www.angelfire.com/va2/Vanja/index.html aŭ kontaktu Vanja Radovanovič (vanja.radovanovic@ericsson.com) por ricevi pluajn informojn.

## 16-a Mont-Kabana Renkontiĝo

Ĉi-jara MKR okazos inter la 22a kaj la 25a de septembro 2005 en Kroatio, en montkabano

"Vila Velebita" (915 m) en vilaĝo Baške Oštarije sur kroata plej longa, plej fama kaj plej bela montaro Velebit.
Velebit streĉiĝas tuj apud la Adriatika marbordo pli ol 100 km longe. Ĉi-jare ni vizitos ĝian mezan parton. La vilaĝo Baške Oštarije troviĝas sur ĉefa strato inter urbetoj Gospić kaj Karlobag kaj per nova aŭtoŝoseo estas facile atingebla de Zagrebo post nur duhora veturado. Alveno trajne kaj buse ankaŭ eblas.
La MKR-ejo troviĝas nur 18 km for de marbordo kaj najbaraj pintoj ofertas belegan rigardon al Adriatiko kaj multaj ĝiaj insuloj. Dum la aranĝo oni faros plurajn ekskursojn - al plej alta kaj plej konata pinto en tiu regiono, Kiza (1267 m) kaj najbaraj pintoj Žuti kuk, Vranji kuk, Ljubičko brdo, Veliki Sadikovac kaj aliaj. Kvankam pintoj estas rokaj, vojoj estas taŭgaj por ĉiuj, eĉ por infanoj.
Pli da detaloj trovu je kutima retpaĝo http://www.angelfire.com/va2/Vanja/index.html.
Ne maltrafu ankaŭ specialan aldonon: kolekton de bildoj de la regiono fotitaj de ses spertaj kroataj montmigrantoj kiuj elektis tiujn bildojn speciale por prezentado de tiu ĉi MKR! Rigardu je http://public.fotki.com/vanja/srednji_velebit-1/.

## Alp-Adria konferenco 2005

Ĉi-jara Alp-Adria konferenco okazos en Triesto, Italio, la 21an kaj la 22an de majo 2005.
La temo de la konferenco estos »Adriatika maro – renkontiĝejo de lingvoj kaj diversaj kulturoj«. La programo ankoraŭ ne estas plenpreparita, pro tio la organizantoj bonvenigas ankaŭ proponojn de partoprenontoj. La programo certe inkludos:

- Prelegon de doktoro Carlo Minnaja »Lingvoj, libroj kaj protokoloj en la teritorio de Venecio«;
- Prelegon de profesoro Bardhyl Selimi - Albanio pri Albana lingvo kaj Albana kulturo;
- Prelegon de inĝeniero Vjekoslav Morankiĉ (Kroatio);
- Prelegon de Marija Beloŝeviĉ (Kroatio).

Precipe bonvenas prelegoj de slovenaj esperantistoj.
La programo ankaŭ inkludos la prezenton de diversaj aspektoj de la Adriatika Maro per bildoj kaj muziko kaj viziton al scienca mara institucio en Triesto
Por pluaj informoj pri loĝado kontaktu Edvige Ackermann (noredv@tele2.it) aŭ testudo@adriacom.it.

## Zamenhofa tago en Celje

La 11. de decembro esperantistoj renkontiĝis en Celje kaj festis la tagon de Zamenhof. Entute partoprenis 21 geesperantisoj el Slovenio kaj eĉ 4 geesperantistoj el Kroatio. Partoprenantoj ne nur ĝuis Esperanto-etoson, sed ankaŭ informiĝis pri la Pekina kongreso per prelego de Tomaž Longyka, pri surprizoj de Vinko Ošlak kaj pri la Eŭropa kongreso en Maribor.
Vinko Ošlak esperantigis poemojn de Srečko Kosovel, tradukis la libron »Fundamento de Esperanto« en la slovenan lingvon kaj preparis la lernolibron de Esperanto surbaze de la lernolibro de profesoro Rudolf Rakuša.
Zlatko Tišljar informis ĉiujn, ke en la jaro 2007 en Maribor okazos kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio. EEU unuiĝas geesperantistoj el la landoj de Eŭropa Unio kaj celas aktive antaŭenigi Esperanton kaj organizi Esperanto aranĝojn ene de Eŭropa Unio.

## Alvoko al kandidatiĝo

Dum la venonta komitatkunsido elektitos nova estraro de TEJO.
Estas la tasko de la elekta komisiono proponi al la komitato kandidatojn, kiujn ili taksas

taŭgaj por la taskoj. La komitato havas la rajton voĉdoni. Pli da detaloj vi trovos ĉe http://esperanto.org/internacia/TEJO/tejo/regularo/e-elekto_de_estraranoj.html.

Ĉiuj, kiuj interesiĝas pri kunlaboro en la onta estraro de TEJO, kontaktu la elektan komisionon kunsendante la plenigitan demandaron. Bonvolu sendi respondon al la retadresoj lowa@gmx.de, ilja@tejo.org kaj gregor.hinker@esperanto.at.

## Esperanto znova omenjen v Delu

Dnevnik Delo je 18. 1. 2005 objavil intervju z arhitektom Borisom Podrecco, kjer je ta izjavil, da »Evropa ne sme biti esperanto«. Združenje za esperanto Slovenije se je takoj odzvalo in pozvalo novinarja ter g. Podrecco, naj bralcem Dela pojasni to izjavo. Poziv Združenja za esperanto Slovenije je dnevnik Delo v celoti objavil, vendar konkretnega odgovora do sedaj še ni bilo.

## Prevod Poročila slovensko-italijanske zgodovinsko-kulturne komisije

Izvršni odbor Združenja za esperanto Slovenije se namerava ob vse pogostejših primerih dejavnosti italijanske desnice odzvati s prevodom poročila slovensko-italijanske zgodovinsko-kulturne komisije o slovensko-italijanskih odnosih v obdobju 1880-1956. To je trenutno edini dokument, ki ga je skupaj pripravilo in podpisalo štirinajst znanstvenikov iz Slovenije in Italije. Besedilo bo prevedla v esperanto Anita Perič Alther, izdala pa ga bosta Združenje za esperanto Slovenije in Mednarodni odbor za zaščito etničnih svoboščin IKEL.

### Universala Esperanto-Asocio bo posredovala glede Esperantskega turističnega društva Ljubljana

Svetovno esperantsko združenje (Universala Esperanto Asocio) bo uradno zaprosilo pristojne državne organe RS glede dogajanja v Esperantskem turističnem društvu Ljubljana. Dejanje skupine članov Esperantskega turističnega društva, ki je protizakonito prodalo prostor in predlagalo izbris društva iz registra ima vse več negativnih posledic za esperantsko gibanje v Ljubljani in v Sloveniji.

## Evropski poslanci in esperanto

Po vključitvi novih članic v Evropsko unijo in po volitvah v posameznih članicah, se je v evropskem parlamentu pojavilo nekaj poslancev, ki so javno podprli esperanto ali so člani esperantskih organizacij. Iz Slovenije je to evropska poslanka ga. Ljudmila Novak. Izvršni odbor ZES se dogovarja za stalno obliko obveščanja evropskih poslancev iz Slovenije o gibanju za esperanto v Sloveniji in še posebej v EU.

## Kontribuu al nia bulteno

Se vi deziras kontribui al la venontaj numeroj de nia bulteno, sendu viajn artikolojn al informoj@volja.net aŭ al la poŝta adreso de Slovenia Esperanto-Ligo. Bonvenaj estas ĉiaj kontribuaĵoj.

**INFORMACIJE / INFORMOJ**
izdaja / eldonas Združenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Tavčarjeva 2/I, p.p. 1643, SI-1001 Ljubljana, Slovenija. / Slovenio. Matična št. / kodnumero 5058384. ID za DDV / n-ro por AVI: SI93737777. Transakcijski račun / bankkonto: 02015-0012704490 pri / ĉe Nova Ljubljanska banka d.d.. (Bankkonto por eksterlando: SI56020150012704490 ĉe Nova Ljubljanska banka d.d., Swift-kodo: LJBASI2X)